

ILEI raportas

Raportas la prezidanto kaj la estraro pri trimonata agado de 2015-10-15 ĝis 2016-01-15

Eventoj

Venonta Konferenco

Nyíregyháza (HU) gastigos nian 49-an Konferencon en 2016 post UK en Nitra (SK). El Nitra al Nyíregyháza saltos la konferencanoj sabate la 30-an de julio. La konferenca temo estos “Novaj vojoj de lernado”, temo elektita de la partoprenantaro de la 48-a Konferenco. Fine de septembro 2015 nia estrarano pri Konferencoj Radojica Petrovic iris al Hungario por viziti la ejojn, renkontiĝi kun la loka skipo kaj prepari tiun nian gravan eventon. En preparo estas riĉa programo kun Instruista Trejnado ITE, seminario pri EO-kulturo kaj interkulturo, prelegoj diversaj, Esperanto-kurso por komencantoj, alia kurso (pri gramatiko aŭ pri interparolado) por progresantoj, Eo-gimnazio, diskutrondoj por interŝanĝi spertojn, simpozio pri la konferenca temo, laborgrupo pri universitata agado, lingva festivalo, eblo ekkoni la hungaran lingvon. Nokta programo okazos, ekskursoj, frandvespero, amuzaj momentoj, do plezurigaj aspektoj ne mankos. Kunveno kaj laboro de la Komitato eble devus fakte aperi kiel unua parto de tiu listo. Reta aliĝilo estis lanĉita kaj unuaj konferencanoj aliĝis en decembro 2015. Printebla aliĝilo kaj pliaj informoj elŝuteblas de ilei.info. En Facebook ekfunkciis paĝo "ILEI-Konferenco 2016" por varbado kaj interŝanĝo de informoj.

Jaro de la LERNANTO

Laŭ instigo de UEA komenciĝos tiu “jaro” okaze de UK en Nitra, precize okaze de la Tago de Lernado, kies programo estas starigita de ILEI. Ĝi daŭros de Nitra UK (2016) ĝis Seula UK (2017). Tiu “jaro” estos ŝanco kaj defio por ILEI; pro tio la ripensoj kaj esploroj jam komenciĝis kaj tiu evento okupos nian tempon okaze de nia 49-a Konferenco.

Vivo de la Ligo

Estraro

Ĉiu estrarano havas sian taskon, siajn taskojn kaj faras tion kun granda atento. Fizika kunveno en majo 2016 estas en preparo ; laŭ la nuna plano kvar personoj povos atingi Les Brenets, Svislando, por tritaga laborkunsido. La ceteraj estraranoj partoprenos per skajpo. Ni prilaboras la tagordon nun.

Venontaj Konferencoj

La estrarano pri konferencoj preparis kaj publikigis konkurson kun detala priskribo de la devoj de la gastiganta sekcio aŭ alia E- organizaĵo. La limdato por kandidatiĝi estas la 31-a de januaro 2016. Do baldaŭ la estraro povos decidi pri la loko de nia 50-a Konferenco en 2017.

Ekzamenoj

Resuma prezento kun ĉiuj aktivaĵoj pri tiu kampo aperis.

Internacia Rajtigita Ekzamenantaro IRE konsistas el 135 membroj.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Nia organo IPR regule aperas kun plenkoloraj paĝoj. Diversaj ILEI-membroj spontane sendas artikolon; aŭ la redaktoro Jozefo Nemeth alvokas al verkado por plenigi la paĝojn. Fine de la laboro, kiam alvenas la redaktofino, ni ĉiam devas rezigni pri kelkaj tekstoj, prokrasti ilian aperon, felietonigi ilin aŭ amputi ilin. La artikoloj rilatas al instruado, pedagogio, kursoj kaj kunvenoj, metodoj. Unu artikolo foje koncernis modifon de la lingvo mem kaj estis pro tio rifuzita. Tiklaj tekstoj, pri kiuj ni povus konsulti la scienca komitaton de nia revuo, ne venis; pro tio tiu saĝularo ne devis helpi al nia redakta grupo.

Juna Amiko (JA) aperas kvarfoje jare kaj plenkolore. Same kiel IPR ĝi havas 3 korektantojn, kiuj atenteme tralegas ĉion post la zorgema prilaborado de Stano Marcek kaj Mireille Grosjean.

Membroprizorgado estas la tasko de Sebastian Cyprych (Pollando)

La **Koleg-helpa Kaso** devas havi revizion en januaro; la laboro estas en la manoj de nia sekretario Emile Malanda Nianga. Kontribuo de niaj membroj al tiu kaso bonvenas; per ĝi ni povas membrigi gekolegojn el evolulandoj. Koran dankon al ĉiuj donacantoj.

La **kolekto de raportoj** same apartenas al la taskoj de Emile Malanda Nianga. Do sekciestroj kaj reprezentantoj: ne forgesu vian devon!

Respondo al demandoj kaj petoj. Daŭre venadas demandoj, instigoj, petoj, kiujn ni devas iel trakti kaj kontentigi laŭ niaj ebloj.

ILEI en la Reto

Estas en Facebook paĝo **"ILEI labortable"**. La diskutoj eblas por membroj, kiuj ne povas partopreni niajn Konferencojn. Do temas pri valora eblo diskuti inter instruistoj pri pedagogiaj aspektoj kaj pri la vivo de la Ligo.

Estas en Facebook paĝo **"Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"**, kie iu persono povas esprimi sin pri la temo instruado-lernado.

Estas en Facebook paĝo **"Duolingo Eo Learners"**, kie multaj komencantoj (2800 personoj aliĝis al la paĝo) esprimas siajn bezonojn, konstatojn, ĝojojn. Valora loko por ideointerŝanĝoj.

Estas en Facebook paĝo **"ILEI-Konferenco 2016"**

Nia retejo www.ilei.info havis diversajn paneojn. Tamen Jozefo Nemeth luktas por ĉion solvi. Ni pripensas pri viŝo de www.ilei-mondo.info, kiu bezonus kompletan renovigon.

Kontaktoj kun movadaj institucioj

UEA. La lanĉo de la Jaro de la Lernanto jam estis menciita. UEA kontribuas al la agado de ILEI per ĉiujara financa kontribuo. Tion ni devas substreki kaj pro tio ni volas danki.

TEJO Nia estrarano pri Konferencoj Radojica Petrovic esploris en Oostende programon por nia Konferenco 2016 por kontentigi tiun partoprenantaron. Subteninda paŝo. Daŭras interkonsultiĝoj pri instrutrejnado de junaj E-instruemuloj dum IJK kaj ILEI-konferenco.

Revuo ESPERANTO; ĝia redaktoro Fabricio Valle proponis, ke ILEI aperu ofte kaj fakte en la revuo. Konsekvence ni pripensas temojn, esploras pri verkantoj, verkas mem; temas pri tre oportuna propono. La artikoloj de Mireille Grosjean "Grava kaj densa estis la Konferenco" (sept.), "Instruista Trejnado: kerna tasko de ILEI" (okt.) "Defio por ni ĉiuj" (nov.) kaj "Kiaj konkretaj agoj per Esperanto?" (dec.) venigis pozitivajn reagojn.

Kiel en la pasintaj jaroj ILEI daŭre sekvas la valoran agadon de **edukado.net**, subtenas kaj kontribuas laŭ siaj ebloj. Por pridiskuti eventualajn kunlaboreblojn la 29-an de decembro Katalin Kováts vizitis Mireille Grosjean en Les Brenets, Svislando. Okazis interŝanĝo de informoj, ekzemple pri la situacio de la KER-ekzamenoj. Plie Katalin informis Mireille pri sia nova projekto por vaste kaj organizite ekzercigi Esperanton al la novlernantoj. Estus bone, se la projekto kiel eble rapide povus ekfunkcii.

ILEI sekvas la evoluon de la **instruado de Eo** en la mondo. La Ligo ricevas informojn pri diversaj provoj kaj planoj, eldono de lernolibroj.

Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

UNESKO Decido de la Komitato de ILEI en Oostende estas, ke ILEI kandidatiĝu ĉe UNESKO. Estis plano, ke ILEI samtempe kun TEJO kandidatiĝu ĉe UNESKO; tamen ŝajnas, ke TEJO havos sian juran sendependecon nur post voĉdono pri statutŝanĝo de UEA. Pro tio la kandidatiĝo de ILEI estis sendita al la sidejo de UNESKO en Parizo la 13-an de januaro 2016.

Union des Associations Internationales / Unio de internacie agantaj asocioj havis kunsidon en novembro en Bruselo, BE. Sinjoro Marc Cuffez, prezidanto de la belga sekcio de ILEI, ĉeestis.

Asocio Eŭropa De la Instruistoj (AEDE) per sia belga sekcio anoncis la Konferencon de ILEI en Oostende kaj aperigis artikolon de Germain Pirlot pri ĝi. Ni devas trovi ligon al tiu asocio, kie ni trovas gekolegojn. Esploroj survojas en diversaj landoj de Eŭropo.

Farendaĵoj

Prepariĝas ampleksa tagordo por nia estrarkunsido maja. Intertempe la kutimaj taskoj por la vivo de la Ligo survojas.

Dankoj

Granda danko iras al ĉiuj. Volontule multaj homoj laboras kaj vivtenas la Ligon efike kaj mondscale. Kuraĝe antaŭen!! Per mona subteno niaj membroj helpas al la Ligo kaj diversaj personoj same finance subtenas ĝin per donacoj; granda danko iras al ili.

2016-01-15 Les Brenets, CH

Mireille Grosjean
Prez. de ILEI